Fervoja Esperantisto

Informilo de Germana Esperanta Fervojista Asocio
Mitteilungsblatt der Deutschen Eisenbahner-Esperanto-Vereinigung
in der Stiftung Bahn-Sozialwerk

GE FA
STIFTUNGSFAMILIE
BSW & EWH

Numero 2 Aprilo - Junio 2025

La fino de senlimeco

Das Ende der Grenzenlosigkeit



La regulaj limkontroloj revenas.
(bildo: muntobildo)
(vd. paĝojn 2 kaj 3)

Die regelmäßigen Grenzkontrollen kommen zurück.
(Bild: Collage)
(s. Seiten 2 und 3)

Karaj gelegantoj	2	Liebe Leserinnen und Leser	2
Go senlima	3	Grenzenloses Go	3
Blanka fumo super Žilina	5	Weißer Rauch über Žilina	5
Seĝoj dumvojaĝaj	8	Sitze unterwegs	8
Novkomenco en la UIC-terminologio	9	Neuanfang in der UIC-Terminologie	9
GEFA en Schleiden-Gemünd	11	GEFA in Schleiden-Gemünd	11
Paneo en Edeno	12	Panne in Eden	12
GEFA-anoncoj, redakcio	12	GEFA-Mitteilungen, Redaktion	12



Karaj gelegantoj,

la regreso ja ne ĵus nur ekkomenciĝis. Nur, ke ĝi ne ĉiam tiel evidentiĝas.

Mi laŭeble komforte instalis min en sidvagono de la nokta trajno Vieno-Amsterdamo kaj drivas inter dormo kaj nebula atento. Mi ne plu aŭdas veturbruojn, nur ankoraŭ la murmuron de la klimatiza instalaĵo. Ni staras en stacio - en kiu, mi ne povas ekkoni. Subite la lumo estas heligata kaj de la vagonfino mi aŭdas energian voĉon: „Personkontrolo, viajn legitimilojn mi petas!“

Ĉiuj estas vekaj, palpas en sia vestaĵo aŭ serĉas sub la rigora rigardo de la du oficistoj hektike en siaj valizoj. Laŭtiĝas. Unu vojaĝanto estas petata eliri la trajnon sed post kelkaj minutoj revenas.

Ni estas en Freilassing envojaĝintaj de Aŭstrio al Germanio kaj nun objektoj de limkontrolo por bridi la nelegalan enmigradon.

Kvardek jarojn post subskribo de la unua Schengen-kontrakto por kreo de komuna „spaco de libereco, de sekureco kaj de juro“ ni komencas, nin denove enmasoni kaj oferi la nemalhelpitan vojaĝo-liberecon al dubinda deziro pri protekto kaj defendo.

Post trikvaronhora eksterplana halto la vagono estas ree malheligata kaj la nokta trajno daŭrigas sian veturon.

Mi turnas min al mia sidnajbarino kaj opinias: „Ni jam estis pli progresintaj.“ Ŝi nur lace kapjesas kaj klopodas daŭrigi sian interrompitan sonĝon. Mi pensas pri miaj travivaĵoj de somero 2014 en Görlitz kaj Muskau, pri „bez granic“, la malapero de la limo al Pollando kaj fermas denove la okulojn.

Guido Brandenburg

Liebe Leserinnen und Leser,

der Rückschritt hat ja nicht gerade erst begonnen. Nur dass er nicht immer so offenbar wird.

Ich habe es mir soweit möglich im Sitzwagen des Nachtzugs Wien-Amsterdam bequem gemacht und treibe zwischen Schlaf und getrübter Aufmerksamkeit. Ich höre keine Fahrgeräusche mehr, nur noch das Rauschen der Aggregate. Wir stehen in einem Bahnhof - in welchem, kann ich nicht erkennen.

Plötzlich wird das Licht aufgeblendet und vom Ende des Wagens höre ich eine energische Stimme: „Personenkontrolle, bitte Ihre Ausweise!“

Alle sind wach, nesteln in ihrer Kleidung oder suchen unter dem strengen Blick der zwei Beamten hektisch in ihren Reisetaschen. Es wird laut. Ein Reisender wird aus dem Zug gebeten, kommt aber nach ein paar Minuten zurück.

Wir sind in Freilassing, aus Österreich nach Deutschland eingereist und nun Objekte einer Grenzkontrolle zur Eindämmung der illegalen Migration.

Vierzig Jahre nach Unterzeichnung des ersten Schengen-Abkommens zur Schaffung eines gemeinsamen „Raums der Freiheit, der Sicherheit und des Rechts“ beginnen wir, uns wieder einzumauern und die unbehinderte Reisefreiheit einem zweifelhaften Bedürfnis nach Schutz und Abwehr zu opfern.

Nach einer Dreiviertelstunde unplanmäßigen Aufenthalts wird der Wagen wieder abgedunkelt und der Nachtzug setzt seine Fahrt fort.

Ich wende mich an meine Sitznachbarin und meine: „Wir waren schon einmal weiter.“ Sie nickt nur müde und versucht an ihren unterbrochenen Traum anzuknüpfen. Ich denke an meine Erlebnisse vom Sommer 2014 in Görlitz und Muskau, an „bez granic“, das Verschwinden der Grenze zu Polen und schließe wieder die Augen.

(trad. Guido Brandenburg)



Marko sur la pavimo: la itala/slovena limo tra la placo antaŭ la stacidomo Nova Gorica
Eine Markierung im Pflaster: Die italienisch/slowenische Grenze durch den Bahnhofsvorplatz Nova Gorica
(Foto: Naturpuur, WikiMedia)

Go senlima

Ke Chemnitz ĉijare estas eŭropa kultura ĉefurbo, probable por neniu estas novaĵo. Ke ĝi tiusence ne estas sola, eventuale tamen. Kiel kultura ĉefurbo ĝi havas dividitan fraton proksimume 600 km pli sude: la iam aŭstra Görz, post la unua mondmilito la itala Gorizia, post la dua mondmilito kaj la parizaj packontraktoj 1947 dividita per ŝajne arbitre fiksita limo en la italan Gorizia kaj la jugoslavan Nova Gorica.
La fervoja linio Jesenice-Sežana inkluzive la ŝtatan stacion (hodiaŭ stacio Nova Gorica), la urborando en oriento kaj la najbaraj vilaĝoj nun apartenis al Jugoslavio. La linio Udine-Trieste kun la suda stacio (hodiaŭ Gorizia Centrale) kaj la origina urbocentro restis italaj.
La historioj pri disigitaj familioj, tratranĉitaj bienoj kaj neeatingeblaj kampoj similis tiujn de la germana interna limo – kvankam la rimedoj

Grenzenloses Go

Dass Chemnitz in diesem Jahr europäische Kulturhauptstadt ist, dürfte für niemanden neu sein. Dass sie damit nicht allein ist, möglicherweise schon. Als Kulturhauptstadt hat sie eine geteilte Schwester etwa 600 km weiter südlich: Das ehemals österreichische Görz, nach dem Ersten Weltkrieg das italienische Gorizia, nach dem Zweiten Weltkrieg und den Pariser Friedensverträgen 1947 von einer scheinbar willkürlich festgelegten Grenze geteilt in das italienische Gorizia und das jugoslawische Nova Gorica.
Die Eisenbahnstrecke Jesenice-Sežana einschließlich des Staatsbahnhofs (heute Bahnhof Nova Gorica), der Stadtrand im Osten und die benachbartan Dörfer gehörten nun zu Jugoslawien. Die Strecke Udine-Trieste mit dem Südbahnhof (heute Gorizia Centrale) und der

de la limfirmigo ĉi tie kaj tie neniel estis kompareblaj.
Estis metala barilo, kelkloke pikdrato, ja gardata sed tamen scenejo de diligenta kontrabandado: kafon orienten, bovo-viandon okcidenten.
Sur la orienta flanko evoluis depost 1948 nova urbeca centro, rapide konstruita, celkonforma, kun juna enloĝantaro – inter ĝi 500 studentoj de la 1995 fondita universitato – simple Nova Gorica.
Sur la okcidenta flanko konserviĝis la solide nobla Gorizia kun burgo, palacoj kaj vastaj parkoj.
Kun la disfalo de Jugoslavio, la fondo de la sendependa Slovenio 1991, ties aliĝo en EU kaj fine en la Schengen-Zono la limo perdis sian dividan efikon. Ĝi restas linio en la mapoj kaj eble sur la stratpavimo, kie ĝi servas al orientiĝo por loki florkuvoj.
Tial la devizo por la komuna aspiro de Gorizia kaj Nova Gorica „Go borderless“ – „Gorizia/Nova Gorica senlima“ aŭ „fariĝu senlima“.



La speciala trajno de Venecio estas alveninta en la stacio Nova Gorica.
Der Sonderzug von Venedig ist im Bahnhof Nova Gorica angekommen.
(Foto: SŽ-Potniški promet)

2020, kiam la ĵurio aljuĝis la titolon, ankoraŭ ne estis antaŭvideble, ke la eŭforio de la senlimeco baldaŭ forvaporiĝos kaj ankaŭ Italio por envojaĝo denove enkundukos limkontrolojn. Aliaj eŭropaj ŝtatoj intertempe procedas simile. Ĉu tiuj kontroloj restos okazaj aŭ ĉu ni baldaŭ rigardos la senlimecon kiel historian epizodon, estas malfacile direble.

eigentliche Stadtkern von Gorizia blieben italienisch.
Die Geschichten von getrennten Familien, zerschnittenen Höfen und unerreichbaren Feldern ähneln denen von der innerdeutschen Grenze – auch wenn die Mittel der Grenzsicherung hier und dort nicht im mindestens vergleichbar waren.
Es war ein Metallzaun, stellenweise Stacheldraht, zwar bewacht, aber trotzdem Schauplatz eifrigen Schmuggels: Kaffee nach Osten, Rindfleisch nach Westen.
Auf der Ostseite entwickelte sich seit 1948 ein neues urbanes Zentrum, schnell gebaut, zweckmäßig, mit einer jungen Bevölkerung – darunter 500 Studenten der 1995 gegründeten Universität - eben Nova Gorica.
Auf der Westseite erhielt sich das gediegen herrschaftliche Gorizia mit Burg, Palazzi und weitläufigen Parks.
Mit dem Zerfall Jugoslawiens, der Gründung des unabhängigen Slowenien 1991, dessen Beitritt zur EU und letztlich zum Schengen-Raum hat die Grenze ihre trennende Wirkung verloren.
Sie bleibt eine Linie in den Landkarten und vielleicht auf dem Straßenpflaster, wo sie als Orientierung für den Standort von Blumenkübeln dient.
Daher das Motto der gemeinsamen Bewerbung von Gorizia und Nova Gorica als europäische Kulturhauptstadt „Go borderless“ – „Grenzenloses Gorizia/Nova Gorica“ oder „werde grenzenlos“.
2020, als die Jury den Zuschlag für den Titel erteilte, war noch nicht absehbar, dass die Euphorie der Grenzenlosigkeit bald verfliegen und auch Italien für Einreisen wieder Grenzkontrollen einführen würde.
Andere europäische Staaten verfahren mittlerweile ähnlich. Ob es bei punktuellen Überprüfungen bleibt oder ob wir auf die Grenzenlosigkeit bald wie auf eine historische Episode zurückblicken werden, ist schwer zu sagen.
Vielleicht sollten wir den Rahmen der europäischen Kulturhauptstadt mit den Konzerten, den Kunstinstallationen, den integrativen An-

Eble ni eluzu la kadron de la eŭropa kultura ĉefurbo kun la koncertoj, la artinstalaĵoj, la integrantaj ofertoj kaj la internacia special-okaze trafikanta trajno de Venecio al Nova Gorica por rigardi kiel la kunvivado povus esti estinta?

geboten und dem internationalen aus dem besonderen Anlass verkehrenden Zug von Venedig nach Nova Gorica nutzen, um uns anzusehen wie das Zusammenleben hätte sein können?

Guido Brandenburg **(trad. Brandenburg)**



Klopodoj pri grupfoto antaŭ la konklavo:
Prezidantinoj ne necese portas uniformon.
Bemühungen um ein Gruppenfoto vor dem Konklave:
Präsidentinnen tragen nicht notwendigerweise Uniform.

Blanka fumo super Žilina

Okaze la enloĝantoj de Žilina atentigas, ke ilia urbo iam estis sidejo de la slovaka registaro – pli vere la „Ministerio kun rajtigo por administrado de Slovakio“, por 54 tagoj je komenco de la ĉeĥoslovaka respubliko en la jaro 1918. Sed ili ne envias la multe pli grandan ĉefurbon Bratislava pro ĝia statuso.

Weißer Rauch über Žilina

Gelegentlich verweisen die Einwohner von Žilina darauf, dass ihre Stadt einmal Sitz der slowakischen Regierung war - genauer des „Ministeriums mit Vollmacht für die Verwaltung der Slowakei“, für 54 Tage zu Beginn der tschechoslowakischen Republik im Jahr 1918. Aber sie neiden der weit größeren Hauptstadt Bratislava nicht ihren Status. Žilina geht es

Žilina videble bonfartas. La urbo gastigas renoman universitaton. Ĝi estas trafika nodo kaj industria kerno. En la urbo estas produktataj aŭtomobiloj kaj aldonaj partoj. Oni multe konstruas. Interalie la stacio estas altkoste renovigata, kio speciale por alvenantaj vojaĝantoj fariĝas defio.



La stacio de Žilina entute estas konstruejo.
Der Bahnhof von Žilina ist insgesamt eine Baustelle.

Sed por vizitantoj kiel la partoprenantoj de la 76-a Internacia fervojista kongreso de IFEF gravis unuarange la ĉarmo de la monumente protektita malnova urbocentro ĉirkaŭ la placo de Maria kun la iama urbodomo kaj multaj zorgeme flegitaj renesancaj frontonoj, aŭ najbare la „Nova sinagogo“, 1931 finkonstruita secesia konstruaĵo, kiu nur dum dek jaroj servis kiel sakraldomo kaj poste kiel kinejo, prelegejo, muzeo aŭ poraranĝa centro.
Kiu emis, povis esti kunirigata de la gvidanto en la tempojn de setlado, firmigo, religiaj militoj kaj fervojkonstruo, poste kun kafo kaj kuko ĝui la sunon aŭ sidiĝi en la trolebuso direkte al la kongresa hotelo.
La hotelo Galileo kelkajn tagojn estis firme en la manoj de la fervojaj esperantistoj. Tie oni loĝis, manĝis, aŭskultis, diskutis kaj muzikis. Aliaj gastoj ŝajne ne ekzistis aŭ ne volis atentigi pri si.
La kongreso enhavis ĉiujn esencajn elementojn, tamen estis kun malfermo ĵaŭdmatena kaj fermo sabatvespera eksterordinare kompakta.
Por fakprelegoj kaj faklaboro restis entute ĉ. kvin horoj, por organizaj aferoj, raportoj kaj novelektoj du kaj duona. Novelektoj almenaŭ

offenbar gut. Die Stadt beherbergt eine renommierte Universität. Sie ist ein Verkehrsknotenpunkt und industrieller Kern. In der Stadt werden Autos und Zulieferartikel produziert. Es wird viel gebaut. Unter anderem wird der Bahnhof aufwendig erneuert, was für besonders für ankommende Reisende zur Herausforderung wird.



En la „granda bio-universo“ hodiaŭ muzikas la ŝtata kamera orkestro Žilina.
In dem „Grand Bio Universum“ musiziert heute das staatliche Kammerorchester Žilina

Aber Besuchern wie den Teilnehmern des 76. Internationalen Eisenbahner-Kongresses der IFEF ging es bei dem Stadtspaziergang in erster Linie um den Charme der denkmalgeschützten Altstadt um den Marienplatz mit dem ehemaligen Rathaus und vielen liebevoll gepflegten Renaissance-Fronten, oder in der Nachbarschaft um die „Neue Synagoge“, einem 1931 fertiggestellten Jugendstil-Gebäude, das nur zehn Jahre als Sakralbau und

tiusence estis gravaj, ke la multjara IFEF-prezidantino Rodica Todor estis anoncinta, post 15 jaroj ne denove kandidati kaj ke antaŭ la kongreso neniu landa asocio estis nomuminta kandidaton.
La nun elektita Andrea Švubova ŝajnis do ankaŭ relative surprizita de la nova situacio. Dum super la kongresejo ŝvebis blanka fumo, la nova prezidantino insiste petis la helpon de la reelektitaj estraranoj kaj de la landaj asocioj.



Ĉu frua formo de grafitio? Al la loĝantoj de Čičmany almenaŭ plaĉis la simboloj.
Eine frühe Form von Graffiti? Den Bewohnern von Čičmany jedenfalls haben die Symbole gefallen.

Unu duontaga ekskurso kondukis al la Burgo Budatin alte super la kunfluo de Kysuca kaj Vah kun ĝia parko plena da enormaj maljunaj arboj kaj kun interesaj ekspozicioj pri objektoj de iamaj loĝantoj kaj pri produktaĵoj de dratuma arto: de la ŝaŭmigilo preter poto-submetaĵo ĝis orfadene inkrustita spegulo.
Celo de la dua ekskurseto estis la montara vilaĝo Čičmany, kies enloĝantoj iam komencis später als Kino, Vorlesungssaal, Museum oder Veranstaltungszentrum genutzt wurde.
Wer mochte, konnte sich vom Reiseführer in die Zeiten von Besiedlung, Befestigung, Religionskriegen und Bahnbau mitnehmen lassen, anschließend bei Kaffee und Kuchen die Sonne genießen oder sich in den Trolleybus Richtung Kongresshotel setzen.
Das Hotel Galileo war für ein paar Tage fest in der Hand der Eisenbahner-Esperantisten. Dort wurde gewohnt, gegessen, zugehört, diskutiert und musiziert. Andere Gäste schien es nicht zu geben oder sie wollten nicht auffallen.
Der Kongress enthielt alle wesentlichen Elemente, war mit der Eröffnung am Donnerstagmorgen und dem Abschluss am Samstagabend jedoch außergewöhnlich kompakt.
Für die Fachvorträge und Facharbeit blieben insgesamt ca. fünf Stunden, für organisatorische Belange, Berichte und Neuwahlen zweieinhalb. Neuwahlen waren zumindest insofern wichtig, als dass die langjährige IFEF-Präsidentin Rodica Todor angekündigt hatte, nach 15 Jahren nicht erneut zu kandidieren und dass im Vorfeld des Kongresses kein Landesverband einen Kandidaten benannt hatte.
Die nun gewählte Andrea Švubova schien dann auch von der neuen Situation einigermaßen überrascht. Während über dem Kongresshotel weißer Rauch schwebte, bat die neue Präsidentin die wiedergewählten Vorstandsmitglieder und die Landesverbände nachdrücklich um ihre Hilfe.
Ein Halbtagsausflug führte zur Burg Budatin hoch über dem Zusammenfluss von Kysuca und Vah mit seinem Park voller riesiger alter Bäume und mit interessanten Ausstellungen von Objekten der früheren Bewohner und mit Erzeugnissen der Drahtkunst: vom Schneebesen über den Topfuntersetzer bis zum goldfaden-eingefassten Spiegel.
Ziel des zweiten Kurztrips war das Gebirgsdorf Čičmany, dessen Bewohner einmal begannen, ihre Holzhäuser mit weißen Symbolen zu bemalen und das Dorf damit zu einem denkmalgeschützten Beispiel der Volksarchitektur

surpentri siajn lignodomojn per blankaj simboloj kaj per tio faris sian vilaĝon monumente protektita ekzemplo de popola arkitekturo. Ĉu la simboloj iam havis mistikan signifon aŭ estis nuraj ornamaĵoj, bedaŭrinde restis kaŝita en la mallumo de la historio. Ĉiakaze ili unike aspektas.

La tuttaga ekskurso estis samtempe transporto al la postkongreso en Bratislava, al kiu nur parto de la kongresanoj estis aliĝinta.

Unu grava mesaĝo estu aldonata: Ankaŭ 2026 okazos IFEF-kongreso. La gekolegoj el Serbio invitis al Beograd kaj Mokra Gora – kaj la IFEF-komitato aprobis la inviton.

machten. Ob die Symbole einmal eine mystische Bedeutung hatten oder schlicht Verzierungen sein sollten, blieb leider im Dunkel der Geschichte verborgen. Auf jeden Fall sehen sie originell aus.

Die Tagesexkursion war gleichzeitig Transfer zum Nachkongress in Bratislava, für den nur noch ein Teil der Teilnehmer angemeldet war.

Eine wichtige Nachricht sei noch ergänzt: Auch 2026 wird es einen IFEF-Kongress geben. Die Kolleginnen und Kollegen aus Serbien haben nach Beograd und Mokra Gora eingeladen - und das IFEF-Komitee hat die Einladung angenommen.

Guido Brandenburg **(trad. Brandenburg)**

Seĝoj dumvojaĝaj …

… apogintaj Bodo Ehrlich al kaj de Žilina

(klarigo p. 10)

Sitze unterwegs …

… die Bodo Ehrlich auf dem Weg nach und von Žilina unterstützt haben

(Erläuterung S. 10)





Novkomenco en la UIC-terminologio

Du jarojn tiel aspektis, kvazaŭ la Internacia Fervojunio ne plu alte taksas plurlingvecon kaj fidindajn tradukojn. Laborlingvo kaj bazo por publikaĵoj kiel reguloj kaj normoj estas la angla. Kial do plurlingveco? La anglan ĉiukaze regas ĉiuj.

La lingvoservo tiusenca estis dispecigata. Gravaj kunlaborantoj forlasis la union. Aliaj estis taskataj per aliaj aferoj. Flegado kaj ĝisdatigo de la terminologia datumbanko RailLexic paŭzis dum la mondo de la fervojo pluevoluis. Almenaŭ aspektis tiel.

Ke la ekstera impreso ne tute ĝustis, por tio pledis la malsukcesa unua provo loki la pozicion de la ĉefterminologo en la normigado kaj tiel en la kvalito-manaĝerado kaj novokupi ĝin. Por tio ankaŭ pledas la sukcesa dua provo fari samon kun alia persono.

Rapide evidentiĝis, ke terminologio malpli rilatas al interpretado kaj tradukado ol al katalogado, kohereco kaj klareco de difinoj. Serĉata do estis specialisto kun koncernaj konoj kaj interesoj.

La nova fakulo nun estas Elisa Callegari el Italio, kiu kun solidaj konoj en itala, franca, angla kaj rusa kaj spertoj en kelkaj aliaj lingvoj venis al UIC en Parizo kaj kiu en sia laboro sekvas la ĝustan sisteman principon.

Post individuaj prezentaj konversacioj ŝi la 7-an de Majo povis videokonference saluti 21 malnovajn kaj novajn kunagantojn el diversaj fervojaj entreprenoj kaj administracioj en la terminologa grupo, faskigi la atendojn kaj diskuti strategion por la daŭrigo de la laboro –

Neuanfang in der UIC-Terminologie

Zwei Jahre sah es so aus, als ob der Internationale Eisenbahnverband keinen Wert mehr auf Mehrsprachigkeit und verlässliche Übersetzungen legen würde. Arbeitssprache und Basis von Veröffentlichungen wie Regeln und Normen ist das Englische. Warum also Mehrsprachigkeit? Englisch können sowieso alle.

Der Sprachendienst als solcher wurde aufgelöst. Wichtige Mitarbeiter verließen den Verband. Andere wurden mit neuen Aufgaben betraut. Die Pflege und Fortschreibung der Terminologiedatenbank RailLexic ruhte, während die Welt der Eisenbahn sich weiterentwickelte. Zumindest sah es so aus.

Dass der äußere Eindruck nicht ganz stimmte, dafür sprach nicht nur der gescheiterte erste Versuch, die Stelle des Chefterminologen in der Standardisierung und damit im Qualitätsmanagement anzusiedeln und neu zu besetzen. Dafür spricht auch der erfolgreiche zweite Versuch, dasselbe mit einer anderen Person zu machen.

Es stellte sich schnell heraus, dass Terminologie mit Dolmetschen und Übersetzung weniger zu tun hat als mit Katalogisierung, Konsistenz und Eindeutigkeit von Definitionen. Gesucht war also ein Spezialist mit einschlägigen Kenntnissen und Interessen.

Die neue Fachkraft ist nun Elisa Callegari aus Italien, die mit fundierten Kenntnissen in Italienisch, Französisch, Englisch und Russisch und Erfahrungen in einigen anderen Sprachen zur UIC nach Paris gekommen ist und die bei ihrer Arbeit den richtigen systematischen Ansatz verfolgt.

specife pri RailLexic, la terminologia datumbanko por nocioj de la fervoja faklingvo.
Esperanto estas unu el la 24 tie reprezentitaj lingvo. Respondecas por ĝi IFEF, nia internacia tegmenta organizo, kiu ne sole estas forumo por apliko de Esperanto, sed ankaŭ fonto de larĝkampa fakscio.
Tie – pli precize en la Terminologia Sekcio de la Faka Komisiono – estas formulataj difinoj, klarigataj nocioj kajk decidataj terminoj, kiuj tiam fluas en la kolekton de RailLexic. Tie nun post dujara paŭzo io ree moviĝos.
Kiu ankoraŭ ne estas implikita kaj interesiĝas pri kunlaboro, bonvolu sin turni al la redakcia adreso.

RailLexic

Guido Brandenburg

Nach individuellen Vorstellungsgesprächen konnte sie am 7. Mai in einer Videokonferenz 21 alte und neue Mitwirkende aus verschiedenen Unternehmen und Verwaltungen der Eisenbahn in der Terminologie-Gruppe begrüßen, die Erwartungen bündeln und die Strategie für die Weiterführung der Arbeit diskutieren - insbesondere an RailLexic, der Terminologiedatenbank für Begriffe der Eisenbahnfachsprache.
Esperanto ist eine der 24 dort vertretenen Sprachen. Für sie verantwortlich ist die IFEF, unser internationaler Dachverband, der nicht nur ein Forum für die Anwendung des Esperanto ist, sondern auch eine Quelle breit gefächerten Fachwissens.
Dort – genauer in der Terminologie-Sektion der Fachkomission – werden Definitionen formuliert, Begriffe geklärt und Termini beschlossen, die dann in die Sammlung von RailLexic einfließen. Damit wird es nun nach zweijähriger Pause weitergehen.
Wer noch nicht eingebunden ist und sich für einen Mitarbeit interessiert, wende sich bitte an unsere Redaktionsadresse.

(trad. Brandenburg)

La seĝoj de Bodo Ehrlich
(vd. fotojn p. 8)

Die Sitze von Bodo Ehrlich
(s. Fotos S. 8)

1: S2 Jeßnitz (Anh.) – Leipzig Hbf. (tief), DB Regio
2: RE50 Leipzig Hbf. – Dresden Neustadt, DB Regio AG Südost
3: EC 173 Dresden Neustadt – Pardubice hl.n., Ceske Drahy
4: EC 143 Pardubice hl.n. – Zilina, Ceske Drahy
5: R 714 Zilina – Trencianska Tepla, ZSR
6: Trencianska Tepla – banloko Trencianske Teplice- Trencianska Tepla, TREZ
7: R 722 Trencianske Tepla – Bratislava hl. st., ZSR
8: Reisebus Schienenersatzverkehr Bratislava-Petrzalka – Parndorf Bhf.
9: REX 6, Parndorf Bhf. – Wien Hbf., ÖBB
10: ICE 26 Wien Hbf – Würzburg Hbf. ÖBB, DB Fernverkehr
11: ICE 786 Würzburg Hbf. – Kassel Wilhelmshöhe, DB Fernverkehr







En Julio 2021 la rivero konkeris la urbon Schleiden. Nun la arto konkeras la riveron:
Ekspozicio „Arto en la rivero“ 14.06.-30.10.2025,
Im Juli 2021 eroberte der Fluss die Stadt Schleiden. Jetzt erobert die Kunst den Fluss:
Ausstellung „Kunst im Fluss“ 14.06.-30.10.2025
(Foto Thomas Hummel, WikiMedia)

GEFA 2-an ĝis 5-an de Oktobro 2025 en Schleiden-Gemünd

En nia antaŭlasta eldono FE 4/2024 ni estis anoncintaj, ke en aŭtuno 2025 ne okazos aparta GEFA-jarkunveno kaj ke ni anstataŭe volas partopreni la komunan Germanan kaj Beneluksan Esperanto-Kongreson metitan en tiun tempon. La lokon kaj la kongrescentron ni same jam prezentis.
Ni uzos la okazon por turni nin tie kiel GEFA kun propra programoferto al pli larĝa publiko.

Kotizoj:
Kun tranoktado kaj manĝoj
Ĵaŭdo ĝis dimanĉo 355 € en 2-lita ĉambro
vendredo ĝis dimanĉo 280 € en 2-lita ĉambro
Sen tranoktado kun 2 manĝoj
Ĵaŭdo ĝis dimanĉo 160 €
vendredo ĝis dimanĉo 130 €
Kompleta superrigardo, partatempaj tarifoj, rabatoj kaj aldonpagoj troveblas sur la interreta paĝo
https://www.esperanto.de/eo/node/3389

GEFA 02. bis 05. Oktober.202 in Schleiden-Gemünd

In unserer vorletzten Ausgabe FE 4/2024 hatten wir angekündigt, dass es im Herbst 2025 kein eigenständiges GEFA-Jahrestreffen geben wird und dass wir uns stattdessen an dem in diese Zeit gelegten gemeinsamen Deutschen und Benelux-Esperanto-Kongress beteiligen wollen.
Den Ort und das Kongresszentrum hatten wir ebenfalls bereits vorgestellt.
Wir werden diese Gelegenheit nutzen, um uns dort als GEFA mit einem eigenen Programm-angebot an ein breiteres Publikum zu wenden.

Gebühren:
Mit Übernachtung und Verpflegung
Donnerstag bis Sonntag 355 € im 2-Bett-Zimmer
Freitag bis Sonntag 280 € im 2-Bett-Zimmer
Ohne Übernachtung mit 2 Mahlzeiten
Donnerstag bis Sonntag 160 €
Freitag bis Sonntag 130 €

Aliĝo eblas rete per https://www.esperanto.de/eo/g-bnlk-2025-aligho,
per retmesaĝo al gek@esperanto.de,
aŭ per poŝto al
Deutscher Esperanto-Bund, Katzbachstraße 25, 10965 Berlin



Guido Brandenburg

Die Gesamtübersicht, die Teilzeittarife, Rabatte und Zuschläge finden sich auf der Internet-Seite
https://www.esperanto.de/de/node/3389
Anmeldung online ist möglich unter
https://www.esperanto.de/de/g-bnlk-2025-aligho,
per Email an gek@esperanto.de,
oder per Post an
Deutscher Esperanto-Bund, Katzbachstraße 25, 10965 Berlin

(trad. Brandenburg)

Paneo en Edeno

Fari eĉ pli bone ion, kion dekomence oni tute ne faru, estas tre perversa formo de progreso.
(Herman Daly, ekonomiisto, Usono)

El: Nula Horo "Kion do nun?", 198, Wolfgang Günther

Panne in Eden

Etwas, das man an sich überhaupt nicht tun sollte, noch besser zu machen, ist eine sehr perverse Form des Fortschritts.
(Herman Daly, Ökonom, USA)

Aus: Nula Horo „Also, was jetzt?", 198, Wolfgang Günther



Redaktofino por FE 03/2025 estos la 15.08.2025		Redaktionschluss für FE 03/2025 ist der 15.08.2025	
Eldono:	Stiftung Bahn-Sozialwerk Zentrale Frankfurt/M.	Herausgabe:	Stiftung Bahn-Sozialwerk Zentrale Frankfurt/M.
Redakcio:	Guido Brandenburg	Redaktion:	Guido Brandenburg
Adreso:	Görlitzer Straße 17 48317 Drensteinfurt	Adresse:	Görlitzer Straße 17 48317 Drensteinfurt
Telefono:	02508-9107	Telefon:	02508-9107
Retpoŝto:	fervoja.esperantisto@t-online.de	E-Mail:	fervoja.esperantisto@t-online.de
Kotizkonto:		Beitragskonto:	
Nomo	BSW Esperanto Essen	Name	BSW Esperanto Essen
IBAN:	DE44 3606 0591 0000 5045 63	IBAN:	DE44 3606 0591 0000 5045 63
BIC:	GENODED1SPE	BIC:	GENODED1SPE
Donacoj estas bonvenaj sur konto:		Spenden sind willkommen auf dem Konto:	
Nomo	Andreas Diemel GEFA	Name	Andreas Diemel GEFA
IBAN:	DE16 5009 0500 0000 9537 29	IBAN:	DE16 5009 0500 0000 9537 29
BIC:	GENODEF1S12	BIC:	GENODEF1S12